# PARIZA FEDERACIO

FEDERATION PARISIENNE des CENTRES CULTURELS "ESPERANTO"

CCP 10482-04 Paris    4bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS    tél 278 68 86

MAJO - JUNIO 1974    N° 10

## KONGRESO DE LA PARIZA FEDERACIO DE ESPERANTO

Malgraŭ la tiel ne bela vetero, alvenis en Sainte-Geneviève-des-Bois, la 10 an de marto, almenaŭ dekon da neanoncitaj partoprenantoj al la jara Kongreso de la Pariza Federacio de Esperanto kiuj aldoniĝis al la kvindeko kiuj, discipline, anoncis sin jam antaŭ tiu tago.

La Kongreso okazis en la granda salonego Gérard Philipe, kiun la urbestraro disponigis al ni. Dum la unua parto, la ĉeestantoj aŭdis kaj diskutis la financan kaj agadan raportojn kies tekstoj estis aperintaj antaŭe en la federa bulteno, kaj kiuj estis poste akceptitaj.

Postpaŭzeto, oni anoncis la rezultojn de la balotado:(vidu ĉe paĝo 2 a).

La komuna tagmanĝo okazis en pavilono en la Parko de la "Châtaigneraie" kie kunveniĝis 55 personoj por gustumi bonegan manĝadon.

La posttagmeza parto de la programo estis Varietea-Prezentado. En tiu programo miksiĝis tre diversaj eroj: gitaro-kantoj, kanzonoj, skeĉoj, sokurismo kaj gimnastiko! Tiu agad-maniero estis bona, ĉar fakte tio venigis iom post iom la parencojn kaj amikojn de la lokaj partoprenantoj en tiu programo. Kaj tiuj, eĉ ĉiuj aŭdis eble por la unua fojo paroli kaj kanti en esperanto.

Entute bonega tago, blanka mejloŝtono en la sinsekvo de niaj jam multnombraj kongresoj. Kaj ni dankas tion al sindoneno de la lokaj zorgantoj, kiuj antaŭvidis ĉion necesan por sukcesigi tiun manifestacion. Des pli ke unu monaton antaŭ la dato de tiu kongreso, la ĉefa zorganto, H.HENRY, frakasis al si la maleonon kaj devis tuj eniri en malsanulejon kiun li nur forlasis por kelkaj horoj,kiujn li, feliĉe por li, povis uzi por ĉeesti la distran parton de la Kongreso.

Koran dankon al ĉiuj zorgantoj de la grupo-Esperanto en la Asocio "RENAISSANCE & CULTURE" kiujn ni ne nomas aparte por esti certaj, ke ni forgesu neniun.

J.A. ROUSSEAU

## LE MOT DU PRESIDENT

Voici le N° 10 du bulletin "Pariza Federacio". C'est donc la dixième fois qu'avec 4 ou 6 pages régulièrement il parait. Son tirage est en moyenne de 300 exemplaires. Il est envoyé à ses lecteurs cinq fois par an: le 1er janvier, le 1er mars, le 1er mai, le 1er septembre et le 1er novembre.

Son but est d'informer officiellement les adhérents sur les réunions et évènements divers propres à leur fédération.

Son but également - car nous ne pouvons nous cantonner dans notre petite sphère - est de signaler les faits relatifs à l'Espéranto de la région parisienne, et même au delà, lorsque nous savons que les parisiens peuvent y trouver leur intérêt ou être appelés à y participer.

A la rédaction des 10 premiers numéros ont collaboré 18 membres de la Fédération. Ceci pour dire qu'il est ouvert à tous. Seule discipline à observer: envoyer les matériaux 43, quai de Champagne 94170 LE PERREUX, avant les 20 décembre, février, avril, août, oktobre.

Remarques pratiques: 1°)- Il est rappelé que les dates des réunions sont toujours données suffisamment à l'avance afin de permettre à chacun de s'organiser au mieux pour y assister.
2°)- Si une lacune des P & T vous privait d'un bulletin vous devez réagir rapidement pour faciliter notre enquête.

"PARIZA FEDERACIO" veut servir la cause de l'Espéranto, mais il n'aura d'efficacité que dans la mesure où ses lecteurs en feront bon usage.

Roger DESPINEY

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Ĉar la kvorumo de la validaj voĉdonantoj ne estis atingita en Sainte-Geneviève-des-Bois la 10-an de marto, oni devas kunvoki duan eksterordinaran asembleon.

EKSTERORDINARA ĜENERALA ASEMBLEO DE LA PARIZA FEDERACIO: sabaton la 18-a de majo 1974
4 bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS    je la 14.45 H.

( v i d u ĉ e p a ĝ o 3 - a )

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## REZULTOJ DE LA BALOTADO DUM LA F.K.

Nombro de validaj voĉdonantoj........ 145
Nombro da voĉdonoj.................. 65
Nombro da validaj voĉdonoj........... 64

| | | | |
|---|---|---|---|
| S-ino AMARIGLIO......... | 59 | voĉoj | elektita |
| S-ro BACHELIER.......... | 34 | " | |
| S-ro DESPINEY D. ........ | 64 | " | elektita |
| S-ro DOURY .............. | 44 | " | elektita |
| S-ro PERAY .............. | 58 | " | elektita |
| S-ro THIERRY ............ | 52 | " | elektita |

La du novaj konsilianoj de U.F.E. estas junaj geesperantistoj: S-ino CASCH Marie-Jeanne Liouville kaj DESPINEY Dominique. Ambaŭ estas membroj de la Pariza Federacio.

---

Le Centre Culturel d'Espéranto du Perreux a organisé une campagne de propagande en faveur du livre de Jean THIERRY " L'Espéranto sans peine".

La sortie de l'ouvrage a été annoncée par trois articles dans la presse locale.

Les principaux libraires ou disquaires de Bry-sur-Marne, Nogent-sur-Marne et du Perreux-sur-Marne ont reçu la visite des responsables du C.C.E.P. et ont accepté de placer en bonne place l'affiche ASSIMIL.

---

A l'occasion de la Semaine Européenne organisée par l'Ecole Centrale à Châtenay-Malabry, s'est tenue une Exposition Philatélique.

Notre ami J.A. ROUSSEAU y a présenté, en trois cadres (36 documents) les oblitérations temporaires des Congrès ou Rencontres Internationaux ou Nationaux d'Espéranto dans les différents pays d'Europe. Une médaille de bronze doré a récompensé cette présentation.

---

Les évènements politiques ont perturbé le programme de certaines manifestations culturelles.

L'exposition: "Télécommunications radio - amateurs et l'Espéranto chez les radio-amateurs" se déroulera à Boulogne-Billancourt non pas les 6-7 avril, mais les 18-19 mai.

Le 2ème Festival des Arts et de la Culture du Perreux-sur-Marne où le Centre Culturel d'Espéranto devait participer est reporté à une date ultérieure.

---

Radioamatoraj aferoj: S-ro Henri CHAISNOT

## NOVA ESTRARO DE LA PARIZA FEDERACIO

| | |
|---|---|
| Prezidanto : | S-ro Roger DESPINEY |
| Vic-Prezidantoj: | S-ro Jean GUILLAUME |
| | S-ro Michel DELATTE |
| Sekretario : | S-ro Etienne GAUDRY |
| Kasisto : | S-ro Jack ROUSSEAU |

---

## ESPERANTO SUR ONDOJ

Por nia legantaro S-ro G. LARGLANTIER afable sendis la jenajn informojn pri programoj kapteblaj en Parizo:

El la listo publikigita en la revuo "Esperanto" vi devas unue forstreki la staciojn: Muritiba, Valencia, Sorocaba, Gdánsk, Bratislava, Sabadell, Clermont-Ferrand, kiuj ne estas kapteblaj en la pariza regiono, per iu ajn ricevilo.

Restas: Warszawa, speciale la matena programo
Sofia vespere, dum speciale favoraj cirkonstancoj.
Roma pli malpli bone
Bern vespere
Zagreb
Pekino (vesperaj elsendoj vendrede kaj sabate)

La Zagreba programo ekde la 8-a de marto okazas vendrede (ne plu ĵaŭde) je la sama horo, per sama ondlongo.

Plie nova programo el Wien estas dissendata ĉiun sabaton de 17.45 ĝis 17.55 franca horo, per mallonga ondo 48,74 m, ripetata la sekvantan dimanĉon per sama ondo de 6.45 ĝis 6.55 matene laŭ franca horo.

La Roma programo estas dissendata per ondoj 50,08 m, 41,24 m, 30,90 m.

Aŭdebleco estas variigebla laŭ kapableco de la ricevilo, atmosfera kondiĉo, sezono (pli bona vintre, ol somere), periodo (pli bone nokte, ol tage), ekstera anteno aŭ ne, proksimeco de elektraj kondukiloj aŭ metalaj masoj, ktp.

---

Plezure ni prezentas la estraron de nova esperantista grupo en RUEIL-MALMAISON: "KULTURA KAJ INTERLINGVISTIKA RONDO"

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | S-ro Louis ENIZAN |
| Sekretario: | S-ro Henri CHAISNOT |
| Historia, prahistoria, arkeologia kaj geologia fako: | S-ro Henri ANCELIN |
| Virinaj kaj junularaj aferoj: | S-ino Zorka ENIZAN |

oooooooooooooooooooooo
oooooooooooooo
oooo

## VISITE DU MUSEE DE L'ILE-DE-FRANCE au CHÂTEAU de SCEAUX

DIMANĈON 19-an de MAJO 1974 : je la 15.00 horo

RENDEVUEJO: ĉe la enirejo de la Kastelo mem (do, transiĝu la kradojn)

En plus de son intérêt culturel cette visite aura un impact de propagande pour l'Espéranto vis-à-vis des autres visiteurs. Venez donc nombreux!

Estas evidente ke des pli multaj estos la Esperantistoj ju pli ili povos fari propagandan pruvon meze de la aliaj vizitantoj.

MOYEN DE COMMUNICATION.

LIGNE DE SCEAUX. Depuis la station Denfert-Rochereau la durée du trajet est, suivant les rames, de 7 ou 15 minutes.

On peut descendre soit à BOURG-LA-REINE (à 20 minutes à pied du Château) soit à PARC DE SCEAUX (à 10 minutes à pied du Château). Attention! toutes les rames ne s'arrêtent pas à PARC DE SCEAUX.

Pour celles et pour ceux qui auraient des difficultés pour marcher, des automobilistes se mettront gracieusement à leur disposition à la station BOURG-LA-REINE.

U.E.A. - DELEGITOJ . Post la vizito de la Kastelo okazos kunveno de la delegitoj kiuj loĝas en la pariza regiono.

## JUNULARA ANGULO

Dum la tritaga pentekosta finsemajno, J.E.F.O. (Junulara Esperantista Franca Organizo) okazigos sian jaran asembleon en junular gastejo de Mantes-la-Jolie, la 1-an, la 2-an kaj la 3-an de Junio.

Pro limigita kvanto da litoj, bonvolu kiel eble plej rapide aliĝi.

Pli detale informas: JEFO - Sekretariaro 4 bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS

++=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+=+

La Junulara Pariza Grupo de J.E.F.O. komune la junaj fervojistoj kaj la anoj de SAT-Junulfako organizos komunan vizitadon de ĥina restoracio komence de majo.

## PASPORTA SERVO

Organizita de T.E.J.O. ĝi konsistas el 16-paĝa broŝuro en kiu troviĝas kvardeko da adresoj en 19 landoj de 5 kontinentoj. La fakto, ke apud la adreso de ĉiu gastiganto troviĝas tre klaraj indikoj pri la dezirataj vizitontoj, aludas la seriozecon de la tuta aranĝo, kiu jes estas destinita ĉefe al la junularo, sed al ĝi povas aliĝi ankaŭ pli aĝaj geesperantistoj.

La broŝuron oni povas akiri kontraŭ aliĝkotizo al la Servo: 5 frankoj, kion oni sendu al: Jeanne-Marie Cash, 72 Rue de Rennes 75006 PARIS. poŝta ĝirkonto 21 572 83 Paris.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

DUA EKSTERORDINARA ĜENERALA ASEMBLEO por aprobo de ŝanĝoj en la statutoj (vidu ĉe paĝo 1-a):

En la artikolo 1-a: ANSTATAŬ: "Par les mots "Région Parisienne", on entend ici les départements de la Seine, la Seine-et-Oise, la Seine-et-Marne et l'Oise". ,- NI ADOPTOS: "Par les mots "Région Parisienne", on entend les départements de Paris (75), de Seine-et-Marne (77), des Yvelines (78), de l'Essonne (91), des Hauts-de-Seine (92), de Seine-Saint-Denis (93), du Val-de-Marne (94) et du Val-d'Oise (95)."

En la artikolo 2-a: ANSTATAŬ: "Le Siège Social de Fédération est à Paris, 34 rue de Chabrol, ème Arrt).,-NI ADOPTOS: "Le Siège Social de la Fédération est à Paris- 75004, 4bis, rue de la risaie. Il peut être transféré en tout autre lieu du territoire de la Fédération sur simple cision du Conseil Fédéral."

(bonvolu turni)

## GRAVA EVENTO

Salutindaj estis la lastaj libroj eldonitaj ekstere de la EP- Movado: "Laŭtema esperanto-franca vortareto" de Duc Goninaz, "l'Espéranto" du Prof. Pierre Janton, "Je parle Espéranto" kaj "l'Espéranto sans peine" de Jean Thierry.

Ankaŭ menciinda estas la ĵus aperinta:

"INTERNACIA KOMERCA-EKONOMIKA VORTARO EN 9 LINGVOJ": angla, esperanto, germana, hispana, franca, nederlanda, portugala kaj sveda. Formato: 15 x 21,5 cm, bindita: 550 paĝoj aĉetebla 4 bis, rue de la Cerisaie-Paris-

Temas pri tre grava kaj urĝe bezonata verko, kiu estas necesa por oficejoj en komerco kaj industrio en vasta senco, por la ŝipmakleristo, ŝipveturiga entrepreno, servodona entrepreno kun eksterlandaj rilatoj, studanto, la sindikata movado kaj por la ekonomisto kiu ĉe siaj studado kaj laboro devas legi eksterlandan literaturon. Krome la libro povas esti tre utila por advokato, notario, librotena revizoro, imposta konsilisto, sociologo, kiel ankaŭ por la leganto kun ĝenerala intereso.

La Asocio "JEAN" invitas vin !

**D I M A N Ĉ O N  L A  9 -a  d e  J U N I O**

PROMENADO EN ARBARO DE SAINT - GERMAIN

sub la gvidado de S-ro KRAEMER

Kuniĝopunkto: Stacidomo ACHERES, je la 11a

Pertrajne: Saint-Lazare- trajno: ĉ. 10.35 H.
Aŭtomobile: N 184 de St-Germain al Conflans-Ste-Honorine.

P R O G R A M O

| | |
|---|---|
| 11.10 | Promenado |
| 12.00 | Tagmanĝo sub arboj (ĉiu alportas siajn proviantojn) |
| 13.00 | Ripozo - Babilado |
| 14.00 | Promenado |
| 16.30 | Reiro al stacidomo ACHERES |
| ĉ. 18.30 | Alveno al Parizo. |

## K A L E N D A R O — M A J O - A Ŭ G U S T O 1 9 7 4

| | |
|---|---|
| **MAJO** | |
| 10-11 | Kongreso de francaj katolikaj esperantistoj en Angers. |
| 18 | Eksterordinara ĝenerala Asembleo de Pariza Federacio ĉe Cerisaie, je la 14.45 H. (vidu ĉe paĝoj 1a, 3a, 4a ) |
| 19 | Vizito de la Muzeo "Ile-de-France" en la Kastelo de Sceaux je la 15.00 H. (vidu ĉe paĝo 3a) |
| **JUNIO** | |
| 1-3 | J.E.F.O. - Kunveno en Mantes-la-Jolie (vidu ĉe paĝo 3a) |
| 9 | Dimanĉo en arbaro de Saint-Germain (vidu ĉe paĝo 4a) |
| 15 | Konsilia Kunveno, ĉe Cerisaie, je la 14.45 H. (Iu ajn membro rajtas partopreni kiel observanto) |
| **JULIO** | |
| 27/7-3/8 | Universala Kongreso de U.E.A. en Hamburgo. |

( ofte relegu tiun ĉi kalendaron )

tranĉu tie ĉi

## V O Ĉ D O N I L O

Se vi ne povos ĉeesti la kunvenon "EKSTERORDINARA ASEMBLEO DE LA 18a de majo", vi rajtas perkoresponde voĉdoni.

Ĉu vi aprobas la ŝanĝojn de la statutoj?

J E S　　N E　　S I N D E T E N O

Bonvolu forstreki la netaŭgajn vortojn kaj sendi vian voĉdonilon al:

"PARIZA FEDERACIO" 4 bis, rue de la Cerisaie 75004 P A R I S .